

---

La juda demando ĉe ZAMENHOF en la cionisma kunteksto de  
PINSKER – SOKOLOV – HERZL – DUBNOV  
Kio komunas, kio diferencas ?

---

Kutime la esperantista historiografio traktas la personecon de L.L. Zamenhof izolite de la historia kaj socipolitika evoluado en la tiam Ruslanda Imperio, kie Zamenhof pasigis sian tutan vivon, aŭ nur aludas ĝin sen tro profunda analizo. Per tio perdiĝas la kunteksto en kiu Zamenhof pensis kaj agis, kio povas konduki al nekompletaj kompreno, interpretado kaj konkludo de la zamenhofaj kontribuoj. En *Spegulo*, somero 2008, p. 83-84, ni analizis Zamenhofon en la pacifisma kunteksto de Hector Hodler, Auguste Forel kaj Edmond Privat. La sekva mallonga studo estas provo esplori la ideologian fonon de la tiamaj judaj socipolitikaj strebadoj kaj konsideri la zamenhofan hilelismon (1901) en la kunteksto de la verkaĵoj de Leon Pinsker, Naĥum Sokolov, Ŝimon Dubnov kaj Theodor Herzl, kvar elstaraj judaj intelektuloj el Ruslando kaj Aŭstrujo-Hungarujo, kiuj agadis en la sama tempo kiel Zamenhof vivis. Ĉar ĉi tiuj personecoj apenaŭ estas konataj en Esperanto-medioj, ni profitas samtempe prezenti iliajn detaletajn biografiojn.

Krom tiu kvaropo al la pli konataj aktivuloj de la cionisma movado siatempe apartenis Judah Alkalai, Chaim Arlozorov, Achad Ha'am, Abba Achimeir, David Ben-Gurion, David Baazov, Meir Bar-Ilan, Menachem Begin, Hugo Bergman, Dov Ber Borochof, Max Bodenheimer, Max Brod, Chaim Weizman, Felix Beltsch, Robert Beltsch, Nahum Goldman, Aaron David Gordon, Dov Grŭner, Artur Herzberg, Moses Hess, Uri Zci Grinberg, Vladimir Ŝabotinskij, Israel Zangwill, Meir Kahane, Berl Katsenelson, Avraam Jitzhak Kuk, Cvi Jehuda Kuk, Mosche Lejb Lilienblum, Golda Meir, Schmuel Mochaliver, Max Nordau, David Raziell, Artur Ruppin, Pinchas Ruthenberg, Nahman Syrkin, Jizchak Tabenkin, Joseph Trumpeldor, Orde Charles Wingate, Menahem Uŝyŝkin, Mosche Scharet, Solomon Schechter, Avraham Stern, Natan Ŝaranskij, Abba Zven, Israel Eldad. En tiu listo rikoltita el la ruslingva Vikipedio estas menciita ankaŭ L.L. Zamenhof.

## Pinsker

*Leon (Jehuda Lejb) Pinsker* (ruse Lev Semjonoviĉ) naskiĝis en 1821 en Tomaszów<sup>1</sup> apud Rovno, Volhinia gubernio, Ruslanda Imperio, kaj mortis en 1891<sup>2</sup> en Odeso. Sian komencan instruigon li ricevis de sia patro Simĥi Pinsker (1801-64), kiu estis konata arkeologo kaj havis lernejon en Odeso. Poste li vizitis inter la unuaj judoj la liceon, el kiu poste fariĝis la odesa universitato, kaj finis ĝin kun grado de ‚kandidato de la juro‘. Ĉar por ruslanda judo la kariero de juristo apenaŭ estis ebla, li studis medicinon en Moskvo kaj revenis al Odeso kiel kuracisto. En la tempo de la Krimea Milito (1856) li laboris kiel kuracisto en militaj hospitaloj. Kunfondinto kaj redaktoro de la organo de la ruslandaj judoj ‚Razsvet‘ (Tagiĝo), Pinsker komence estis adepto de la klerigo

---

<sup>1</sup> Nuntempe Tomaszów Lubelski en Pollando.

<sup>2</sup> La 9an de decembro.

(haskalao) kaj de la asimiliĝo de la diasporaj judoj en la ruslanda kultura ĉirkaŭaĵo. Sed la pogromoj, eksplodintaj kontraŭ la judoj en 1871 kaj precipe en 1881 en suda Ruslando kaj la ilin akompananta kontraŭjuda politiko de la carisma reĝimo, igis lin rekonsideri la proprajn vidpunktojn, kio kondukis al la rifuzo de la asimiliĝo kaj de la haskalao.

Dum vojaĝo tra okcidenta Eŭropo en 1882 Pinsker diskutis en diversaj ĉefurboj la problemon de la elmigrado de la judoj, inter alie kun membro de la brita parlamento, kiu samtempe estis reprezentanto de la brita judaro. Sekve al tiuj diskutoj estiĝis en Berlino la anonima germanlingva broŝuro kun la titolo *Aŭtoemancipiĝo*.<sup>3</sup> La teksto estis skribita sub la moto de Hillel (!) „Se mi ne helpas min mem, kiu do? kaj se ne hodiaŭ, kiam do? La ĉefaj konkludoj de lia Aŭtoemancipiĝo povas esti resumitaj tiel:

- La judoj ne estas vivanta nacio, ili estas ĉie fremduloj, pro kio ili estas malestimataj;
- La civila kaj politika egalrajtigo de la judoj ne sufiĉas por levi ilin en la respekto de la popoloj;
- La sola rimedo estus la kreo de juda nacieco, de popolo kun propra tero, la mememancipiĝo de la judoj, ilia egalrajtigo kiel nacio inter la nacioj pere de akiro de propra patrujo;
- Humanismo kaj klerigo ne estas radikalaj rimedoj kontraŭ la malsano de nia popolo;
- La manko de nacia sento kaj memfido, de politika iniciatemo kaj de unueco estas la malamikoj de nia renaskiĝo;
- Por ne plumigradi de unu diasporejo al la alia, estas bezonata propra punkto por nia kolektiĝo;
- La internacia juda demando bezonas nacian solvon kaj kongreson, kiu organizas la renaskiĝon.

Analizante ankaŭ la psikologiajn radikojn de la antisemitismo, en sia teksto, kiu trovis viglan eĥon ĉefe en la cionista movado Ĥovevej Cion, kies centro estis Odeso, la aŭtoro fakte anticipis kelkajn ideojn de Theodor Herzl. Finfine Pinsker venis al la konkludo, ke la lando Erec-Israel estos la plej taŭga elmigrejo. Dum la de li iniciatita Katovica kongreso (1884) estis formulita la ideo de la kreado de la agrikultura laborado en Israelo. En 1891 fakte komenciĝis la unua ondo de enmigrado de judoj en Erec-Israelon, sed la turkaj aŭtoritatoj malhelpis ĝin, tiel ke la setliĝo rapide kriziĝis. Tiam Pinsker venis al la konkludo, ke por la agrikultura agado Argentino povus esti taŭga, dum Erec-Israelo restu la spirita centro de la juda popolo. Ene de la organizo Pinsker estis subtenata de barono Edmond de Rothschild. En 1934 la korpaj restaĵoj de tiu fama cionisma teoriulo estis enterigitaj en Jerusalemo.<sup>4</sup>

## Sokolov

*Naĥum Sokolov* naskiĝis en 1859 en Wyszogród apud Plock, Pola Reĝlando, Cara Imperio, en familio kun longa talmuda erudicia tradicio, kaj mortis en 1936 en Londono. Kvankam en Okcidento li estas kutime malpli konata ol Theodor Herzl, li aperas antaŭ niaj okuloj samrange kiel unu el la plej signifaj gvidantoj de la cionismo kaj neforgeseblaj ĵurnalistoj-publicistoj de la hebrea lingvo (ivrito). Sian bazan instruiĝon li ricevis unue ĉe la avo kaj patro, poste sub la influo de la fama ĥabad-lubaviĉa rabena dinastio (Ŝneerson). En la aĝo de 17 jaroj, li edziĝis kaj loĝis dume en

<sup>3</sup> Germane: Autoemanzipation. Rusa traduko de Ju. Gessen aperis en Sankt Peterburgo, 1898.

<sup>4</sup> Laŭ diversaj fontoj en interreto kaj laŭ Elektronnaĵa Evrejskaja Enciklopedija ([www.eleven.co.il](http://www.eleven.co.il)).

Maków. Kiam en 1880 Sokolov translokiĝis al Varsovio, li ricevis aldonajn profundajn sciojn pri talmudaj, literaturaj, artaj kaj historiaj aferoj kaj avancis al eŭropa inteligentulo kun universitata diplomo. Kun sia lingva talento (li sciis ne malpli ol 12 lingvojn) Sokolov trovis vojon al la publika vivo. Post kiam Sokolov komencis skribi por la gazeto ‚Hacefira‘ (Ha-Cfira, La Tempo), hebrea gazeto aperinta en Varsovio. li rapide dominis la enhavon de la periodaĵo, kiun li redaktis kune kun Ĥaim Selig Slonimskij (1810-1904), kiu fondis la gazeton en 1861 (refondita en 1874). Kiel pioniro de la hebrea publicistiko Sokolov alportis al la gazeto la dimension de la socisciencoj: aperis artikoloj pri historio, literaturo kaj literaturscienco, lingvistiko, teatroarto. Aparte interesaj kaj valoraj fariĝis liaj kronikaj kontribuadoj pri aktualaj okazaĵoj en la internacia juda vivo, unuafoje verkitaj en la hebrea lingvo laŭ moderna eŭropa ĵurnalisma normo. Vojaĝante tra Eŭropo kaj Usono, Sokolov konigis siajn legantojn kun la geografio de tiuj landoj kaj la juda vivo tie. Samtempe Sokolov kontribuis ankaŭ al aliaj periodaĵoj kiel *Israelita* en la pola kaj *Der Telegraf* en la jida. Plej signifa tamen restis lia verkado publicistika, felietona kaj kleriga en la hebrea lingvo, tiel ke vasta publiko, kaj la religia, kaj la laika, apartenis al liaj legantoj. Kiel adepto de la haskalao Sokolov celis pruvi, ke eĉ pri la plej komplikaj temoj eblas skribi en la antikva hebrea lingvo. Krom publicistiko Sokolov verkis ankaŭ poezion, rakontojn, eseojn, pri antisemitismo kaj eĉ pri la filozofio de Kantio. Kiel kontraŭulo de la asimiliĝo Sokolov konsideris, ke la hebreoj devos renaskiĝi laŭ la nacia formo. Kvankam de la religio li distanciĝis, Sokolov samtempe celis reveki ĉe la judoj ilian interesiĝon pri la judaj religiaj tradicioj kiel naciaj valoroj. Gravan kontribuon Sokolov faris ankaŭ per sia jara literatura almanako Ĥa-Asif (Rikolto), kiu aperis sesvolume inter 1885 kaj 1894, arigante ĉirkaŭ si la plej talentajn kulturajn hebrelingvajn fortojn, kaj kiu esence kontribuis al la elformiĝo de hebrelingva gazetaro.

La ideojn de Leon Pinsker kaj ties ‚Aŭtoemanciĝon‘ (1882) Sokolov rifuzis, riproĉante al li melodramemon, pesimismen kaj fantaziemon kaj alvokante al la sinteno de progreso kaj klerigo kiel solaj realaj opcioj por solvi la judan demandon. Same Hacefira malagnoskis la ideojn de la movado Ĥovevej Cion, kaj same malvarme Sokolov rilatis komence al la cionismo kaj la ĉefverko ‚La juda ŝtato‘ (1896) de Herzl. Sed kiam Sokolov partoprenis kiel gazet-korespondanto la unuan cionistan mondkongreson en Bazelo en 1897 kaj tie persone konatiĝis kun Herzl, li revenis entuziasma kaj fariĝis arda propagandisto de la politika cionismo kaj konvinkita kunlaboranto de Herzl. Por sia agado li uzadis la gazeton Hacefira, kaj en 1903 li eĉ tradukis al la hebrea lingvo la utopian romanon de Herzl, ‚Altneuland‘. En 1906 komenciĝis la praktika agado de Sokolov en la internacia cionista organizo en diversaj funkcioj – kiel ĝenerala sekretario (sub D. Wolfson), kiel prezidanto de la estraro (sub Ĥaim Weizmann) kaj, 1931-35 kiel prezidanto de la organizo. En tiu periodo Sokolov efektivigis vastan organizon, diplomatan kaj politikan laboron, vizitante la judajn komunumojn en dekoj da landoj, renkontante multajn ŝtatajn kaj politikajn gvidantojn, inter alie en Ruslando, Turkujo, Erec-Israel kaj Vatikano. Sokolov estis akceptita de papo Benedikto XV (1917) kaj de Benito Mussolini (1927), li engaĝiĝis kun Ĥaim Weizmann en la konkretigo de la Balfour-deklaracio (1917) kaj en la Pariza Packonferenco, kaj en Ligo de Nacioj Sokolov reprezentis la judajn delegaciojn. En 1925 li ĉeestis la inaŭguron de la Juda Universitato en Jerusalemo, partoprenis sennombrajn kunvenojn kaj kunsidojn kaj organizis la internaciajn cionistajn kongresojn de la 20aj jaroj. Sokolov postlasis 217 verkaĵojn en 304 publikaĵoj aperintaj en 12 lingvoj. Inter la gravaj libroj troviĝas lia ‚Historio de la cionismo‘ (1919). En 1956 la korpaj restaĵoj de tiu elstara juda gvidanto, kiu kunigis la praktikan, politikan

kaj kulturan cionismon, estis enterigitaj en Jerusalemo.<sup>5</sup> Iusence Sokolov ludis por la judoj tiun rolon, kiun Edmond Privat ludis por la esperantistoj.

## Herzl

La altranga signifo de *Theodor Herzl* situas en lia ĵurnalisma-verkista, organiza kaj politika agado por la cionismo. Naskita en 1860 en Pest (Budapeŝto), Aŭstrujo-Hungarujo, Herzl kreskis en asimiliĝinta aŭstra-germana familio, en kiu lia patro estis komercisto (ligno). Herzl studis juron en la viena universitato kaj membris en akademia studenta organizo Albia, kiun li forlasis pro ĝiaj antisemitismaj tendencoj. Fariĝinte doktoro pri juro, li trapasis en 1884-85 juran praktikumon en Vieno kaj Salzburgo. En 1889 li edziĝis kaj havis tri infanojn. Herzl debutis kiel verkisto de komedioj, kiuj estis eĉ publike prezentitaj en Vieno. Sekve li fariĝis korespondanto de la viena „Neue Freie Presse”. Antisemitismajn tendencojn en Vieno li observis kun kreskanta skeptiko. En 1894 li raportis pri la Dreyfus-skandalo, kiu laŭ propraj eldiroj senpere kondukis al la ellaborado de lia plej konata verko „La Juda Ŝtato”, kiu aperis en 1896 en Lepsiko/Vieno, kiu trafe analizis la drastan situacion de la judaro, la kialon de la antisemitismo kaj kiu reprezentis verdiran programon de la cionismo, per kiu la juda demando estu definitive solvita. Ne temas pri religia verko, ankaŭ ne pri utopia skizo, sed pri realisma fundamento de la cionismo, kies ĉefa hipotezo estis, ke la fondo de juda ŝtato estas necesa kaj ebla.

Sociologian asimiliĝon de la judaro Herzl rifuzis. Sukcesan asimiliĝon li imagis nur pere de miksitaj geedziĝoj. La parlamentan monarkion kaj la aristokratan respublikon li konsideris kiel plej dezirindaj ŝtataj formoj, sed ekskludis la unuan por la juda ŝtato. En la ĉapitro pri la lingvo Herzl konsideris la hebrean lingvon netaŭga opcio por la lingvo de la juda ŝtato. Kiel modelon por la lingva demando Herzl menciis la lingvan federismon de Svislando (kiun Zamenhof same adoris). Rilate la religion li reprezentis laikan pozicion. Herzl bonvenigis setlantojn de ĉiuj nacioj kaj konfesioj, ignorante la problemojn, kiuj povos aperi kun la araboj, kiuj rifuzos la judojn. Kiel flago por la juda ŝtato, kiu devus esti neŭtrala, li imagis sep orajn stelojn sur blanka grundo.

Kun Max Nordau Herzl organizis en 1897 la unuan cionistan mondkongreson en Bazelo (Svislando). La t.n. „Bazela Programo” formis la bazon por politikaj intertraktadoj kun germanaj kaj turkaj politikistoj dum lia vojaĝo al Palestino. Ankaŭ en 1897 Herzl publikigis sian teatraĵon kun la titolo „La nova getto” kaj fondis en Vieno la cionistan revuon „Die Welt” (La Mondo). En 1899 li fondis en Londono la Jewish Colonial Trust por krei fondaĵon por aĉeti terenon en Palestino. En 1902 li fondis, kun Zalman Davis Levontin, la Anglo-Palestine Company, kiu estis la antaŭulo de la Banko Leumi. La t.n. Uganda Programo, kiu estis proponita de Britio al Herzl por la nova patrujo de la judoj, fiaskis, ĉar la judoj povis imagi nur Palestinon kiel patrujon. En 1900 Herzl publikigis siajn „Filozofiajn Rakontojn”, kaj en 1902 aperis lia utopia romano „Altneuland”, en kiu Herzl skizis la idealan judan ŝtaton. Ĉi tiun verkon Naĥum Sokolov tradukis en la hebrean lingvon sub la titolo „Tel Avivo”, kio signifas printempan monteton. Herzl mortis pro kormalsano en 1904 en Edlach, Malsupra Aŭstrio. Li estis enterigita en Vieno. Laŭ la propra testamento en 1949 la korpaj restaĵoj de Theodor Herzl kaj liaj gepatroj estis transigitaj al Jerusalemo. Apud li kuŝas ankaŭ liaj du infanoj Pauline kaj

---

<sup>5</sup> Laŭ diversaj fontoj en interreto kaj precipe laŭ Elektronna Evrejskaja Enciklopedija ([www.eleven.co.il](http://www.eleven.co.il)).

Hans, dum lia plej juna fratino, Margarete Trude, kiu fariĝis viktimo de la holokaŭsto, ne havas tombon.

## Dubnov

Finfine indas kaj necesas trakti la biografion de *Simon (Ŝimon, Semjon) Dubnov*, la ĉefa protagonisto de la juda historiografio. Dubnov naskiĝis kiel filo de ligno-komercisto kaj kiel nepo de rabeno en 1860 en Mstislavl, Mohileva gubernio (Blankrutenio/Belorusio), Ruslanda Imperio kaj mortis, kiel viktimo de la holokaŭsto, en Riga (Latvio). Edukita laŭ tradicia maniero en la domo de sia avo, Dubnov kritike perceptis la ortodoksan ĥederan edukadon de judaj knaboj, kiun li perceptis per sia propra ribelado kontraŭ la talmudo. Je la ĉagreno de la avo, Dubnov distanciĝis de la religio kaj dediĉis sin al la haskalao, la juda kleriga movado, postulante la abolon de la ĥedera sistemo.

Fuĝante de la mallarĝa vivo en juda ŝtetlo kaj sen posedi restadpermeson, Dubnov forveturis en 1880 al Sankt-Peterburgo kaj Odeso, poste al Vilno, skribante por diversaj periodaĵoj kaj aktive observante la politikan evoluon ekde Aleksandro II. ĝis la transpreno de la potenco far la bolŝevikoj. Intertempe li havis la okazon debati kun la eminentaj intelektuloj de sia tempo kiel Aĥad Ha'am (Aŝer Ginsberg, kiu verkis la antaŭparolon al la ‚Aŭtoemancipiĝo‘), Frug, Kagan, Kulischer, Lifschitz, Kantor k.a. Liaj artikoloj, en kiuj li malkaŝis sian politikan pozicion, aperis en ‚Voshod‘, ‚Russkij Evrej‘ kaj (kio mankas en la kutimaj biografioj), en ‚Razsvet‘ de 1882 reage al la pogromoj en Varsovio. Kiel konate ankaŭ Zamenhof enmiksiĝis samjare en tiun ĉi diskuton, kaj ŝajnas, ke Dubnov apogis liajn konsiderojn (vd. Maimon, La kaŝita vivo de Zamenhof, p. 93).

Malkovrinte sian interesiĝon por la historiografio, en 1881 Pinsker tradukis la ‚Popularan Historion de la Judoj‘ de Heinrich Graetz al la rusa lingvo; ĉar la enkonduko al la verko estis censure malpermesita, ĝi devis aperi poste en aparta broŝuro en eksterlando. Sekve Dubnov dediĉis sin al la studado de la ĥasidismo. En 1898 li verkis lernolibron pri la juda historio (3 vol., Odeso 1898-1901) kaj komencis ellabori sian ĉefan verkon, la ‚Mondan Historion de la juda popolo‘, kies unuan parton li povis publikigi kiel aldonaĵon al la gazeto ‚Voshod‘, poste kiel apartajn volumojn (1904-6, 4a vol. 1914). Dubnov kunlaboris al ‚Jewish Encyclopedy‘ (1901-5) kaj ‚Evrejskaja ĉciklopedija‘ (1908-13). Kiel aktivulo de pluraj organizaĵoj Dubnov klopodis por la klerigo de la judoj kaj starigo de judaj lernejoj.

La historiisto Dubnov engaĝiĝis ankaŭ politike: Post la kiŝinjova pogromo de 1903 li alvokis la aktivan memdefendon de la judoj. Okaze de la elektoj al la ŝtata dumao (ruslanda parlamento) en 1905 varbis por la partopreno de judaj partioj. Li mem fondis judan sekcion de la partio de la konstituciistoj-demokratoj (kadetoj) kaj en 1906 iniciatis propran ‚Judan Popolpartion‘, kiu ekzistis ĝis 1918, sed restis sensignifa. En Peterburgo li instruis en la kursoj pri orientologio, fonditaj de barono David Ginsburg (1857-1910) kaj apartenis al la fondintoj de la historia-etnografia asocio. 1909-18 li redaktis la gazeton ‚Evrejskaja starina‘. Ankaŭ li fondis historiografian ĵurnalon en la hebrea lingvo kun la titolo ‚Ĥe-Avar‘ (1918), en kiu li gvidis la rubrikon pri ĥasidismo.

La februaran revolucion de 1917 li bonvenigis kiel longe sopiratan liberigon de la diskriminacio, sed rapide seniluziiĝis. Dum la oktobra revolucio li avertis la judojn, ke ligo de ilia sorto kun la bolŝevikoj estas problemo. Ĝis 1922, eltenante malfavorajn ekzistajn kondiĉojn, la internan militon kaj la ruĝan teroron, Dubnov klopodis renovigi la judan vivon en Ruslando, sed baldaŭ komprenis, ke li ne havos estontecon ĉi tie.

Tial en aprilo 1922 li vojaĝis tra Estonio al Kovno en sendependa Litovio, kie estis promesata al li katedro en la loka universitato, sed kiel judo li tamen ne ricevis la ŝancon. Tial li daŭrigis al Berlino, kie li trafis la okcidentan judismon. Kvankam li jam estis 62-jara, en la germana ekzilo sekvis la plej fruktodona periodo de lia vivo. Inter 1925 kaj 1929 aperis lia ĉefverko, la dekvoluma ‚Monda Historio de la juda popolo‘. En 1931 sekvis la eldono de lia ‚Historio de la Ĥasidismo‘ en du volumoj. Ĉiujn librojn li publikigis unue en la germana lingvo, sekvis tradukoj al la lingvoj rusa, hebrea, jida kaj angla. Per sia historiografia laboro li celis korekti erarajn interpretojn faritajn en la pasinteco kaj prezenti la historion de la judoj en la ĝenerala monda historio. Li distanciĝis de la tradicie eksplicita spirithistoria metodo por konsideri en pli forta grado ankaŭ sociajn kaj ekonomiajn aspektojn, krom tio problemojn de la konstitucia juro kaj de la ĉiutaga vivo. La principojn de sia historiografia aliro li priskribis en artikolo el la jaro 1893 pri la temo ‚Kio estas juda historio?‘

En Berlino Dubnov starigis kun Jakov Tejtcl la Asocion de ruslandaj judoj. Inter liaj konatoj troviĝis Ĥaim Naĥman Bialik, la posta hebrea nacia poeto. Kun Einstein li preparolis la projekton de juda universitato por Eŭropo. Dubnov estis malferma al diskutado kun homoj de plej diversaj tendencoj. Plej laste li verkis sian aŭtobiografion por la jaroj 1880-93. En 1933 li eksciis, ke lia ‚Monda Historio‘ apartenas al la malpermesitaj kaj bruligitaj libroj.

Kvankam li ricevis la opcion forveturi al Usono, en aŭgusto 1933 Dubnov preferis iri al Riga, kie vivis liaj familianoj – fatala decido. Tie aperis la rusa traduko de la ‚Monda Historio‘ kaj la unuaj du volumoj de lia memuaro. En 1940 li povis fini la trian parton de sia ‚Libro de la vivo‘ pri la jaroj 1922 ĝis 1933 en Riga, kiu estis okupata de la sovetianoj. Sed la 1an de julio 1941 la germanoj invadis la urbon. En septembro Dubnov estis arestita kaj sekve pelita en la judan getton, kie la 29an de novembro komenciĝis la amasmurdo. La 8an de decembro li estis forkondukita de sia domo. Laŭ la raporto de iuj atestantoj la 81-jaran intelektulon persone likvidis la komandanto Johann Siebert, kiu kiel studento aŭskultis lin prelegi en Heidelberg. Lia taglibro, kiu notis la okazaĵojn ĝis la plej lastaj tagoj, ne povis esti retrovita.

En la filozofio de tiu elstara pioniro de la orienteŭropa juda historiografio, kiu dokumentis gravajn eventojn de la historio de la ruslanda judaro, estis esprimita pasia pledo por la judaj memkonscio, emancipiĝo kaj aŭtonomeco kiel nacio en transnacia kunteksto, rilate la administradon, lingvon kaj edukadon. En la diasporo la juda popolo disvolvis apartan socialan sistemon kaj komunuman ideologion. La judan religion Dubnov konsideris kiel rimedon de la nacia memdefendo de la popolo. Ĉar dum la emancipiĝa procezo la juda popolo perdis la religion kiel defendan funkcion, ĝi, kunlaborante kun aliaj popoloj de la mondo, devas krei laikan kulturon, kies lingvo estas la jida. En tiu kunteksto Dubnov rifuzis la cionismon kaj la asimiliĝon, preferante la koncepton de la aŭtonomiismo, kiun li klarigis en siaj ‚Leteroj pri la malnova kaj nova judismo‘ ( ‚Voshod, 1897-1902). Dubnov do celis iun spiritan naciismon, kiu estus ligita kun ĝeneralaj civitanaj devoj de la judoj en iliaj diasporaj landoj. Laŭ sia pensado Dubnov estis influita de la okcidenteŭropa liberala kulturtradicio, kiun li povis ligi kun sia ruslanda historia sperto, kio faris lin la ideala peranto inter la okcidenta kaj orienta judaroj.<sup>6</sup>

Zamenhof

---

<sup>6</sup> La biografioj estis originale verkitaj en Esperanto laŭ diversaj fontoj en interreto kaj kompletigitaj laŭ Elektronnaja Evrejskaja Enciklopedija (www.eleven.co.il).

Kiel konate, L.L. Zamenhof, naskita en 1859 en Bjalistoko kaj mortinta en 1917 en Varsovio, inventis la internacian lingvon Esperanto kaj verkis lingvan-religian programon (kiun eblas nomi ankaŭ politika-socia), kiu fariĝis konata sub la titolo hilelismo,<sup>7</sup> poste homaranismo. Pri kio temas?

Kiel Zamenhof diris en intervjuo por *Jewish Chronicle* (1907), en 1884 li distanciĝis de la cionismo kaj nenion plu entreprenis rilate la judan demandon, tamen ne perdante ĝin el la okuloj. En aprilo 1901 aperis en Varsocio broŝuro en rusa lingvo sub la titolo *Hilelismo*. Projekto por la solvo de la juda demando. Kiel aŭtoro subskribis iu „Homo Sum” (ruslingve *Гомо Сум*) – fakte sendube neniu alia ol la 41-jara L.L. Zamenhof mem, ĉar Kiel aŭtoro de la hilelismo li volis resti nekonata. Laŭ propra eldiro la verkaĵo reprezentis la frukton de lia deksepjara pripensado de la juda demando.

Sian hilelismen *Homo Sum* dissendis al kelkaj „inteligentaj” judoj, interalie al Abram Kofman en Odeso. Al tiu ĉi Zamenhof ankaŭ komunikis siajn motivojn por krei la hilelismen. Konsistanta el kvin partoj kaj daŭrigata el samtema artikolo en *Razsvet* el 1882, la hilelismo de 1901 ne nur enhavis tre interesan analizon pri la situacio de la juda popolo en la diasporo (aŭ ekzilo) el la vidpunkto de Zamenhof, sed prezentis ankaŭ konkretajn proponojn por solvi tiun judan demandon. Zamenhof estis konvinkita, ke nur la hilelismo povas esti la vera solvo de la juda demando.

En kio do konsistis la ĉefaj ideoj de la hilelismo? La unuopajn tezojn oni povas simpligite prezenti jene. Baziĝante sur la aserto, ke la ekzisto de la juda popolo estas anakronismo, ĉar la judismo estas difinita nur per sia specifa religio kaj ke krom la kredo ne ekzistas historia ligo al la antikva judismo nek al Palestino-Israelo, la judismo sekve distanciĝis kaj fremdiĝis disde sia origina stato. Kun la fino de la judismo en la antikva tempo la judaro perdis sian socian-politikan signifon kaj ĝia ekzista pravigo estas reduktita sole al la kredo. La posteuloj de la antikva juda popolo, kiu vivus dissemita tra la mondo, estas ligitaj inter si nur per la komuna kredo kaj la komunaj suferoj, kiujn kaŭzis tiu kredo. La nocio de la juda popolo estas sekvo de iluzio, trompo de la sentoj kaj enradikiĝinta metaforo, komparebla kun persono, kiu jam de longe ne plu ekzistas kaj kiu estas nur ombro de si mem. Fakte, la juda popolo entute jam delonge ne plu ekzistas. Do, la hodiaŭaj judoj havus nenion plu komunan kun sia malnova patrujo Palestino-Israelo kaj ankaŭ perdis sianligon kun sia biblia lingvo. En vero la judoj ne plu reprezentas popolon, sed ekzistas kiel germanoj, francoj, poloj ktp. kun mosea kredo. Samtempe ili ne estus veraj germanoj, francoj, poloj. Ĉe tiu formulo, kiu baziĝas sur sofismo kaj falsecoj, temas pri artefarita kaj perforte kreita kompromiso, konfuzo de nocioj, eĉ mensogo. Ĉar la judoj ne disponas pri unuecigaj simboloj Kiel komuna lingvo, komuna lando, komuna politiko, ili ne povas esti konsiderataj Kiel popolo; la judaj estas makismume religia grupo de homoj sen historio. Eĉ komunan religion ili ne praktikas kaj kelkaj ateistaj judaj intelektuloj eĉ rifuzus la judan religion. La juda popolo same malekzistas Kiel malekzistas protestanta popolo. Ankaŭ ne eblas pareoli pri juda raso. Per la elpelado de la judoj el la antikva patrujo komenciĝis la por judoj tipa ekzilo kaj senfina suferado. Ĉi tiu por judoj karakteriza sorto estis kaŭzita pro tio, ke la juda popolo, diference de aliaj antikvaj popoloj, kiuj neniigis kaj absorbis unu la aliajn, kontraŭstaris al sia propra morto kaj per tio al ĝenerala leĝo de la historio. Pro tio unike la judoj estis trafataj de tiu speco de ekzilo, kaj la juda demando restis en sia kvalito Kiel status quo dum jarmiloj. La juda demando do havas sian kaŭzon interne de la judismo, kaj aliaj popoloj ne povas transpreni la respondecon por tiu sorto. La dua kaŭzo de la sorto de la judoj estas, ke ĉe la estiĝo de la kristanismo rifuzus aliĝi al la

---

<sup>7</sup> En Esperanto oni kutimas skribi la vorton kun unu l.

nova religio, kvankam la nova religio konsistis plimulte el judoj. Do, kompare kun la paganoj, kiuj transiris al la kristanismo, la judoj rifuzis transiri al la kristanismo. En sia unika konsisteco surbaze de religio kaj naci(ec)o la judismo distingas sin de aliaj religij kaj popoloj. Ĉi tiu interligiteco kaŭzis la liberan evoluon de la judoj en fatala maniero. Ĉar krome tiu unika etika-filozofia sistemo ne estis destinita por aliaj popoloj, sed nur por la popolo de Israelo, sekve la juda religio ne estis alirebla por nejudoj. Tial ekestis nesuperebla muro inter judoj kaj nejudoj, kun la konsekvenco, ke la nejudoj komencis eterne malrespekti kaj persekuti la judojn.

La cionismon Zamenhof rifuzis. Ĉi tiu estas nur alloga frukto de nesufiĉa kompreno de la esenco de la juda demando. La celo de la renaskiĝo de la juda popolo baziĝas sur religia revo, kiu perdis ĉian socian-politikan signifon. Sub la formo de la cionismo tiu celado aperis artefarite kaj estas propagandata artefarite, havus nenion komunan kun la sana racio. Zamenhof koncedis al cionismo maksimume utilitisman funkcion, ĉar ĝi povus pruviĝi kiel taŭga metodo por fini la suferojn de la judaj fratoj; krom tio Zamenhof konsideris la cionismon kiel sensencan reeldonon de la antikva israela naciismo. Kaj li menciis la problemon de Turkujo, kiu laŭ li neniam estus preta akcepti la koloniadon, kiu estas organizita de la cionistoj. Do, cionismon, koloniadon en Palestino kaj revivigon de la hebrea lingvo Zamenhof konsideris kiel iluziojn kaj vanajn klopodojn. Eĉ se okazus kelkaj mirakloj por la judoj evidentiĝus neniuj rezultoj, pro la ekzistanta realeco, kiu estas malfavora al la judoj.

La tuta juda demando do dependas de la juda religio kaj de la religio dependas ankaŭ la solvado de la juda demando.

Tiel Homo Sum alvenis al la konkludo, ke la solvo de la juda demando ekzistas sole en la neceso, ke la judoj devas ŝanĝi sian religion. Kaj ĉar la judoj perdis siajn originajn lingvon, religion, naciecon, ili reprezentus taŭgan „materialon“, el kiu eblus formi novhebrean popolon, kun nova lingvo kaj nova religio. Nur tiel eblus starigi novan ponton inter la antikva kaj la aktuala, aŭ estonta juda popolo.

La hilelismo estus nur ekstere io nova, dum en ĝia kerno ĝi restus tipe juda. Fakte intelektaj, liberpensaj judoj praktikus jam delonge ian tian kredon, la tasko do restus konvinki la judojn pri la neceso de tia „teozofia religio“, ĉar ĉiuj principoj de la hilelismo estus akcepteblaj finfine por ĉiuj. Per la enkonduko de la hilelismo la juda demando estus definitive solvita kaj la juda popolo, kiu per ĝi fariĝus vera nacio, ne plu estus malrespektata kaj persekutata de aliaj popoloj. El la „fikcia popolo“ do estus kreita ne nur „reala popolo“, sed esence „neŭtrale-homa popolo“, popolo de la estonteco kun „natura patrujo“, popolo kiu „formas la komencon de estonta unuigita homaro“, kie malamo kaj kvereloj ne plu ekzistus. La „granda historia misio de la juda popolo“ estus per tio finita. Eĉ konkretan tempan efektivigon Zamenhof donis – nome post dek ĝis dek kvin jaroj la hilelismo povus esti efektivigita, do pli fure ol la palestina juda ŝtato, kiun Zamenhof konsideris kiel utopion, aŭ fantazion.<sup>8</sup>

En sia resumo Homo Sum resumis sian programon, kiu konsistis el tri punktoj:

- Purigi la hebrean religion per hilelismo.
- Krei por la hebreoj propran lingvon.
- Elekti ian difinitian lokon por la judoj.

Interesa estas la konstato, ke en la unua vico troviĝas la religio, kaj nur en la dua vico sekvas la lingvo, kaj en la tria la vivoloko.

Zamenhof en la kunteksto de Pinsker, Sokolov, Herzl kaj Dubnov

---

<sup>8</sup> Hilelismo de L. Zamenhof, kun traduko de Adolf Holzhaus. Helsinki 1972.



Se en tiu ĉi malgranda studo oni volus konklude kompari la biografion kaj verkon de Pinsker, Sokolov, Herzl kaj Dubnov kun tiuj de Zamenhof, eblas observi kelkajn interesajn koincidojn, sed ankaŭ gravajn diferencojn. Ĉiuj tiuj samtempuloj okupiĝis pri la juda demando kaj la cionismo. Zamenhof (kun)fondis en 1881 varsovian filion de Ĥibat Cion kaj poste transprenis funkcion en Ĥovevej Cion, kies fondo estis esence aranĝita de Pinsker en Odeso. Kvankam Zamenhof forlasis la cionisman movadon plej malfrue en 1887, ĉar li perdis sian kredon en la cionismon kaj por dediĉi sin al Esperanto, la juda demando ja daŭre okupadis kaj akompanis lin dum la tuta vivo. En sia Hilleismo de 1901 li rifuzis la „antikve-izraelan naciismon“, kiu elvokis la cionismon. Pseŭdo-asimilismon kaj cionismon li nomis vana fantazio. Samtempe li konsciis, ke ne eblas resti en tiu ĉi ŝtato (Ruslando), ĉar ĝi estas netolerebla kaj la judoj devas serĉi eliron el ĝi.

Ĉar Zamenhof neniam referencis al io ajn, kion li legis, aŭ al iu ajn grava aŭtoro (ankaŭ tiu fakto malfaciligas la komprenon de la origino de la zamenhofaj ideoj), ni ne scias, ĉu Zamenhof konis aŭ legis la verkaĵojn de la menciitaj judaj aktivuloj, kiuj aperis dum lia vivotempo. Mi volus starigi la hipotezon ke jes, almenaŭ la gravajn aferojn. Se li ne legis ilin, tiukaze li almenaŭ konis ilian ekziston (ĉar supozeble Zamenhof legis judajn gazetojn). Zamenhof reagis pri la varsoviaj pogromoj en „Razsvet“ komence de 1882, la verko „Aŭtoemancipiĝo“ de Pinsker aperis en aŭtuno 1882. Kun Sokolov Zamenhof, ambaŭ varsovianoj, estis rekte aŭ malrekte en kontakto tra lia patro kaj tra la gazeto „Hacefira“ (kiun lia patro devis cenzuri ĝis la fino de 1888 !!!) Tra Maimon, „La kaŝita vivo de Zamenhof“, p. 185-6, kiu baziĝis je la raporto de du atestantoj, ni krome scias, ke L.L. Zamenhof elpaŝis kun sia hilelismo en la domo de Sokolov okaze de la Ĉiulundaj Kunvenoj en 1902 aŭ 1903. Kvankam Zamenhof kiel homo estis alte apreziata de ĉiuj (kvankam oni konsideris lin verŝajne ankaŭ strangulo), Sokolov ne aprobis la lingvon Esperanto.<sup>9</sup>

La „Juda Ŝtato“ de Herzl aperis en 1896, kaj en 1901 sekvis la „Hilelismo“ de Zamenhof, kiu daŭrigis la diskuton de la juda demando. Kiam la verko de Herzl aperis, Zamenhof restadis en Grodno. Zamenhof mem raportis, ke la ideo de la hilelismo aperis ĉe li en la jaro 1896 (kiam li vivis en Grodno), oni rajtas supozi, ke lia ideo pri hilelismo estis reago post legado de la „Juda Ŝtato“ de Herzl, aperinta en la sama jaro. En intervjuo kun la revuo „Jewish Chronicle“ en Londono de la 6a de septembro 1907 Zamenhof fiere rakontis pri sia iama engaĝiĝo por la cionismo, emfazante ke li fariĝis cionisto longe antaŭ Herzl diskonigis sian ideon pri la juda ŝtato. Ĉar la intervjuo supozeble estis redaktita, ni ne povas centprocente scii, ĉu Zamenhof tiam vere tion diris kaj menciis la nomon de Herzl.

Ankaŭ pri Dubnov Zamenhof devis esti informita, ĉar Dubnov reagis al la varsoviaj pogromoj de 1881 en la gazeto „Razsvet“. En ĉi tiun diskuton enmiksitis sin ankaŭ Zamenhof ekde 1882. Komence de 1903 Dubnov denove reagis al la kiŝinjavaj pogromoj, same kiel Zamenhof reagis al la bjalistokaj pogromoj de 1905 kaj precipe 1906, eĉ publike aludante ilin dum sia fama parolado de la ĝeneva Esperanto-mondkongreso en tiu jaro.

Resume: Dum Pinsker do revis pri la mememancipiĝo de la judoj, ilia egalrajtigo kiel nacio inter la nacioj pere de akiro de propra patrujo kaj akiro de nacia sento kaj memfido, de politika iniciatemo kaj de unueco en komuna punkto, kie la judoj laborus

---

<sup>9</sup> Ĉi tion oni scias tra la tre leginda libro Nahum Sokolow. Life an Legend. By Florian Sokolow. London 1975, p. 76-77, kie lia filo mencias ankaŭ L.L. Zamenhof kaj lian elpaŝon pri la hilelismo en la kunvenoj en la varsovia loĝejo de Nahum Sokolow.

kiel terkulturistoj, la pragmatulo Sokolov propagandis la praktikan, politikan kaj kulturan cionismon. Kun Herzl li vidis la ontan patrujon de la judoj en Israelo. Rifuzante la cionismon, Dubnov esprimis pasian pledon por la juda memkonscio, emancipiĝo kaj aŭtonomeco kiel nacio en transnacia kunteksto. Rifuzante ajnan naciismon, Zamenhof, tamen ŝanceliĝante inter cionismo kaj patriotismo, vidis nur unu solvon de la juda demando, en jene triobla propono: enkonduko de nova religio kaj nova lingvo por la judoj, plus serĉado de taŭga vivloko por la judoj, konsekvence al la perditaj religio, lingvo kaj patrujo de la judoj.

### Okulfrapaj paraleloj

Fine indas entrepreni la provon de konkreta komparo. Ĉiuj tri, Pinsker, Herzl kaj Zamenhof, analizis en la unua parto de siaj ĉefverkaĵoj (Aŭtoemancipiĝo 1882, La Juda Ŝtato 1896, Hilelismo 1901) la aktualan situacion de la judoj kaj la kaŭzojn de la antisemitismo. Iliaj analizoj pri la juda demando parte okulfrape similis (senhejmeco, ekzilo, diasporo), la premisaj konsideroj pri ilia malfeliĉo en principo kongruis (la judoj kiel malamata kaj persekutata elemento), tamen la traktitaj temaj prioritatoj variis kaj precipe la konkludoj en la detaloj estis diversaj.

Traktitaj estis, de ĉiuj tri pensuloj, la problemo de la eterne malestimataj judoj, kiuj ĉie estas nekonataj fremduloj, eksterlandanoj, malrespektataj kaj neeltenataj de la aliaj nacioj. Tio estus la kazo pro manko de tiuj atribuoj, kiuj estas necesaj, por ke popolo estu rekonata kiel nacio. Pinsker menciis la mankon de propra patrujo, de centro, de registaro kaj reprezentantoj, la malekziston de la judoj kiel nacio, ĉar jam delonge formortinta. Sub la premo de la romia regado la juda ŝtato malaperis antaŭ la okuloj de la popoloj. Sed eĉ post kiam la juda popolo rezignis pri sia ŝtata-korpa ekzistado en la politika senco, ĝi tamen ne povis esti tute ekstermita kaj ne ĉesis daŭrigi sian ekzistadon spirite kiel nacio. La posta mondo malkovris en tiu popolo la makabran aperaĵon en formo de promenanta mortinto inter la vivantoj, tiel ke ĝi fariĝis fantomo el karno kaj sango. La judofobio kiel speco de psiĥozo estus kaŭzo, ke oni timas la judojn kiel fantomon.

La pluekzistadon de la judoj Zamenhof klarigis en sia ‚Hilelismo‘ per la neebleco de la juda popolo historie morti, t.e. intermiksiĝi kun ĉirkaŭantaj elementoj kaj tiel submetiĝi al la reciproka ensorba procezo, kiu estas karakteriza por la aliaj antikvaj popoloj. Due, la judoj decidis ne aliĝi al la nova kristana religio, kiam tiu ekestis, do ili restis kun sia antikva religio (kiu cetere laŭ li intertempe perdis sian sencon). Sekve, la judoj nenie sukcesis esti respektataj kiel egalvalora popolo. Do, la nuna ekzila situacio de la hebreoj malebligas ilian integriĝon kiel propra popolo en la sino de la aliaj popoloj. La ĉefa problemo estus, ke mankas al ĝi komuna lingvo, komunaj moroj, komuna teritorio. La ‚Hilelismo‘ havas la celon krei inter hebreco ‚normalan hebrean popolon‘, kiu estos rekonata kaj respektata de ĉiuj ceteraj popoloj. Por ke oni ne plu rajtu malestimi ĝin, la hebrea popolo devos posedi la atribuojn kiel komuna religio, komuna lingvo, komuna difinita loko, kie ĉiuj hebreoj povus koncentriĝi. Ĉe Zamenhof la malamo kontraŭ la judoj fontas do, kiel ĉe la aliaj teoriuloj, en la nesolvita juda demando, kiu siaflanke estus grava interna problemo de la juda popolo. Dum por Herzl la juda demando simple estis nedigestita restaĵo de la mezepoko, pri la problemoj de la judoj laŭ Zamenhof ne kulpas la ceteraj popoloj. La ĉefa problemo estus, ke la religieca judismo fariĝis nealirebla por la nejudoj, kaj pro tio estiĝis nevenkebla muro inter la judaro kaj nejudoj. Tio alportis eternan malammon kontraŭ la judoj. Dum Zamenhof skribis en la ‚Hilelismo‘, ke la juda (aŭ hebrea) popolo estas nur sekvo de iluzio, de trompo de sentoj, kaj ke pro

la malrespekto far aliaj popoloj la judoj mem komencis dubi pri si mem, Pinsker konstatis, ke la judoj eĉ ne konus la senton de la neceso ekzisti kiel nacio. Ankaŭ Herzl menciis la problemon de la memdubo ĉe la judoj. Ambaŭ, kaj Pinsker kaj Zamenhof, parolis ankaŭ pri la kosmopolitismo de la judoj. Sed dum Pinsker celis la kreon de juda nacio en la politika senco, Zamenhof parolis nur pri fondo de aparta komunumo. Ŝajnas, ke Zamenhof, forlasinte tiun ĉi mondon antaŭ 1918, kiam aperis sendependaj nacia ŝtatoj, inkluzive de Pollando kaj Litovio (kaj Israelo en 1948), ne povis imagi la nacian ŝtaton (kvankam en sia hilelismo li uzas la terminon ŝtato), Do Pinsker pensis kaj argumentis kiel Herzl pli politike, Zamenhof pli socie-kulture, proksime al Dubnov.

Ĉiuj tri pensuloj do vidis la neceson elimini la premisojn por la juda demando kaj trovi *modus vivendi* sur la bazo de la internacia juro (ĉi tiun terminon uzitan de Pinsker Zamenhof ne uzis, kvankam li nomis la kriteriojn por la nacio, kiel ili estas formulitaj laŭ la moderna internacia juro). En sia „Juda Ŝtato” Herzl postulis *tabula rasa* rilate la malnovajn, eksajn, konfuzajn, limigitajn imagojn. Herzl ne ekskludis la eblecon, ke la judoj povus esti absorbitaj de la ilin ĉirkaŭantaj popoloj, kondiĉe ke oni lasus la judojn en paco dum du generacioj. Ĝuste tiun ĉi temon Zamenhof traktis en sia hilelismo, el historia perspektivo.

En unu punkto Zamenhof kaj Pinsker kun sia koncepto pri „homo” ankoraŭ renkontiĝis: Pinsker skribis en sia „Aŭtoemancipiĝo”, ke la judoj sentas sin ne nur kiel tiaj, sed kiel homoj. Kaj kiel homoj ili dezirus vivi kaj esti nacio. „Judo” kaj „homo” – ĉu sinonimoj? Kiel ĉefan kaŭzon por la moderna antisemitismo Herzl vidis ĉefe la akran ekonomian konkurencon, kiun kaŭzis la judoj kaj kiu ĝenas la mezan tavolon de la kristana burĝaro. En sia „Juda Ŝtato” Herzl traktis detale la taskojn de la Juda Kompanio, kiu respondecos pri la starigo de la monfonduso kaj la financa flanko de la konstruado de la juda ŝtato.

Traktante detale la judan demandon, en la juda gazeto „Razsvet”, 1 februaro 1882, Zamenhof inter alie menciis la kreon de elmigrada monfonduso. Sed li estis skeptika, ĉar tiam la monrimedoj preskaŭ ankoraŭ ne ekzistis (kvankam judaj bankoj kaj riĉuloj jam ekzistis). Ankaŭ Pinsker menciis la starigotan akcian societeton por la aĉeto de teritorio.

## Lingvo kaj religio

Ĉiuj tri tuŝis ankaŭ la problemon de la lingvo. Pinsker lamentis, ke al la judoj mankas komuna lingvo, komunaj moroj, sen fari konkretan lingvan proponon. En sia „Juda Ŝtato” Herzl ne povis imagi, ke la hebrea lingvo estos la komuna lingvo de la juda ŝtato. Cetere li revis pri iu lingva federismo laŭ la modelo de Svislando. En la zamenhofa „Hilelismo” la lingva demando fariĝis, kiel konate, centra temo. Zamenhof konsideris taŭga nek la jidan, nek la hebrea lingvon por la hebreoj kaj proponis solvi la lingvan problemon de la judoj per Esperanto aŭ per nova hilelisma lingvo, ĉar la lingvo estus la plej bezonata bazo de popoleco. La potencon de la revivigo de la hebrea lingvo Zamenhof, same kiel Herzl, komplete subtakis. Ankaŭ Zamenhof laŭde menciis neŭtralan Svislandon kiel la „naturan konstantan centron de la tuta esperantistaro”.

Rilate la religion, Herzl rekomendis tolereman socion sen teokratio. Ĉiu estu libera por praktiki religion laŭ sia volo. Eklezio kaj armeo havu sian indan lokon en siaj templo kaj kazerno kaj ne enmiksiĝu en la aferojn de la ŝtato. Zamenhof avertis, ke la hilelismo ne estas nova juda sekto, sed reprezentas „novan religion partion”, ankaŭ ne temas pri nova religio aŭ nova religia kredo. La hilelismo korespondas ne pli kaj ne malpli al la sama religio, kiun la judoj ricevis siatempe de Moseo kaj de la profetoj, sed al la hilelismo mankas la anakronismaj elementoj, kiuj kun la tempopaso markis la judan

religion. Sub la hilelismo oni do povus kompreni nur „eksteran socian-religian organizon“ en la kadro de la jam ekzistanta juda religio. Do, ĉe la hilelismo temus pri la „homa“ flanko de la religio, ne pri la „spirita“, do finfine pri la demando de la reguligo de la kunvivado de la juda komunumo. La hilelismo ricevis sian nomon lau la Ora Regulo esprimita de Hilelo mem „Kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same“ aŭ „Kion vi ne deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ ne faru al ili.“ Specialaj temploj hilelistaj estu instalitaj por praktiki la novajn formojn hilelistajn. Ĉu rilate tiujn templojn li pensis pli pri la modelo de la sinagogo aŭ framasonaj temploj oni ne scias.

Pri la elmigraj celoj de la judoj regis diversaj opinioj: estis menciitaj Nordameriko, Argentino kaj aliaj landoj, tamen ĉiuj tri programistoj finfine venis vole ne vole al la konkludo, ke nur Palestino povos esti la natura patrujo de la judoj. La plej fortajn dubojn pri Palestino havis Zamenhof, kun Pinsker, kiu postulis la emancipiĝon de la judoj en tiuj landoj, kie ili dume vivas.

Interesaj estas fine la konsideroj pri la ontaj rilatoj kun la turkoj. Pinsker (1882) menciis la eblon de starigo de suzerena paŝaliko en la azia parto de Turkujo, kiu estus rekonata de Turkujo kaj de la aliaj potencoj kiel neŭtrala teritorio. Herzl (1896) revis pri tio, ke la judoj povus helpi al la turka ŝtato reguligi ĝiajn financajn aferojn, kondiĉe ke la sultano pretus cedi al la judoj Palestinon. Zamenhof (1901) dubis, ĉu la turkoj konsentos, ke oni povos forpreni aŭ aĉeti de ili provincon okupatan de ili, kaj ĉu la turkoj estus entuziasmaj, se la judoj koloniigos la landon regatan de ili. Zamenhof prave timis, ke la judoj ekhavas novajn problemojn ankaŭ kun siaj najbaroj en Palestino, dum Herzl en sia entuziasmo pri Palestino ŝajne iom malatentis tiun fakton.

Malgraŭ certa restskeptiko, Zamenhof, Pinsker kaj Herzl ne kredis je la asimiliĝo kaj estis profunde konvinkitaj, ke la judan demandon necesas kaj eblas nun solvi.

#### Kelkaj bedaŭrindaĵoj kaj fina konkludo

La Hilelismo (1901) de Zamenhof restis publike ne konata, ĉar diskonigata nur en privata rondo, kaj kiel konate nek la judoj, nek la esperantistoj favoris ĝin. Sekve Zamenhof koncentriĝis pri la diskonigo de sia neŭtrala lingvo Esperanto, tamen sen rezigni pri la evoluado de sia Homaranismo, kiu restis lia ‚kara ideo‘ kaj kiu ĝis 1913/17 ricevis plurajn prilaboritajn formojn. Origine direktita al la judoj (de Ruslando), la Homaranismo de Zamenhof pli kaj pli ricevis universalan karakteron, sed ĝi restis ankrita en la juda filozofio de la sav-misio.

Do, same kiel Esperanton oni ne povas rigardi kaj trakti disde de la hilelismo-homaranismo, same la hilelismon (almenaŭ tiu de 1901) oni devas percepti kaj trakti en la kunteksto de la tiamaj diskutoj pri la juda demando. La hilelismo de Zamenhof estis eta, marĝena kaj sensignifa, kontribuo al tiu debato.

Andreas Künzli, 2009